Михаил Лермонтов,

La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,

Anĝelo

tradukita de Vasilij Devjatnin

En mezo de nokto, en blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—
Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto en juna animo
Restadis sen vort', sed kun viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,
Je revo mirinda pri Di' plenigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,

Der Engel

tradukita de N. N. 98

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html`.

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin`.

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de Михаил Лермонтов *(∗1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)

Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo `http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html`. *Vidu ankau:* `http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm`.